Verda lumo № 5

de la «Verda lampo», diĝesto

https://verdalampo.info

Dum mi pretigis novan informon por la retpaĝaro, elektis lokon, kiun mi vizitos sekvasomere (post la pandemio vekiĝis inklino lokŝanĝi), okazis nekorektebla: komencis la milito inter Rusio kaj Ukrainio. Per intellekto mi komprenis tion, sed la koro rifuzis kredi...

Tiam aperis la anekdoto:

Elkomatiĝas malsanulo kaj demandas la doktoron:

- Kio okazas en la mondo?
- Rusio kaj Ukrainio militas.
- Kontraŭ kiu?

***

Komence mi nur ploris (la filo iĝis soldato-volontulo), poste provis skribnoti miajn impresojn kaj pensojn. Preskaŭ tuj mi rizignis tion, sed kelkaj notoj restis en la retpaĵaro.

10.04.2022. Mi sidas ĉe la monitoro kaj ploras, aŭskultante la kanton "Ne plu militon!" Ĝi estas unua "milita" emocio post la 24-an de februaro 2022.

Verŝajne venis tempo por pripensi lastajn eventojn, akcenti ion kaj argumenti la propran opinion.

***

Per kiu lingvo konversacias la ukrainoj? Miaj eksterlandaj amikoj-korespondantoj demandas min pri lingva situacio en la lando. Ili ofte estas konsternitaj, kiam miaj honestaj respondoj ne kongruas ilian konon. Bonvolu legi >>>>>

***

Mi ŝatas legi kaj havas la grandan bibliotekon en la diversaj lingvoj.

Nun, kiam mi esperantistiĝis, aperis la novaj bretoj de esperanto-literaturo. Ne, mi ne volas fanfaroni, sed al mi plaĉos, se vi spektos kaj iom envios.

***

Trastudinte la libron de V.Lanti, mi estis entuziasmigita pro liaj ideoj kaj provante kompreni ilin mi iĝis la membro de SAT.

***

La 29-an julio — la 1-an de augusto 2022 okazis la 95-a internacia Kongreso SAT.

El arkivo: 71-SAT-Kongreso en Odeso 1998. Rememoras T.Popova (rus.).

***

La **24-27-an** de novembro 2022 okazis la 3-a Virtuala Kongreso + Retoso.

Mi longe atendis ĝin, intencante priskribi miajn impresojn, sed konstante mankis elekroporovizado...

***